Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

Jarkolekto 31 - n-ro 4/5 ★ Julio - Oktobro 2026



Kultura Tago en Veghel 06

Nederlando

De Schatkamer enhavas trezoraĵojn ankaŭ pri Esperanto

10

Internacie

Raportoj pri la 111-a Universala Kongreso en Graco

12

Ceteraĵoj

Nova bongusta rubriko: Esperanta kuirarto

21

Fenikso
Revuo de
Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
ISSN 1384 - 6515

★

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton. La jara kotizo en 2027 estas €45 por membroj pli ol 30-jaraj, €20,- por membroj ĝis 30-jaraj kaj €15,- por samhejmano.

Kunlaborantoj de *Fenikso*
Ĉefredaktoro: Paweł Fischer-Kotowski
Redaktoroj: Thijs van Viegen, Paweł Fischer-Kotowski
Korektantoj: Bert de Wit, Inge Demmendaal
Konsilanto: Ineke Emmelkamp

Limdato: Materialo por la sekva numero estas bonvena **ĝis la 8-a de novembro 2026.**

Informoj pri Esperanto
Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
info@esperanto-nederland.nl
050 571 88 42

Studosemajnfino/studieweekend
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Esperanto Nederland enrete
https://www.esperanto-nederland.nl
https://facebook.com/esperanto.nederland
https://t.me/EsperantoNederland
https://twitter.com/EsperantoNL

Sendu viajn kontribuojn al
redakcio@esperanto-nederland.nl
Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj. La redakcio decidas pri la publikigo de la tekstoj.

Estraro

estraro@esperanto-nederland.nl

Prezidanto: Marc van Oostendorp
Nederlandse Taal en Cultuur
Radboud Universiteit Nijmegen
Postbus 9103 6500 HD Nijmegen
prezidanto@esperanto-nederland.nl

Sekretario: Rob Groeneveld
Scharounlijn 44, 2728 BT Zoetermeer
06 19 77 35 27
sekretario@esperanto-nederland.nl

Kasisto: Kees Neeft
Van Alphenplein 84, 2353 CN Leiderdorp
kasisto@esperanto-nederland.nl

Estrarano: Peter van Noorden
Tamarixplantsoen 203, 1702 JD Heerhugowaard
petervn@esperanto-nederland.nl
06 22 61 32 49

Estrarano: Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
informado@esperanto-nederland.nl

Membro-administranto: Koos Scharroo
Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord
membroj@esperanto-nederland.nl
06 22 41 32 67
Ekz. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero ktp.

Pri sociaj komunikiloj
sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl

Bankkonto:
IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
Nome de Esperanto Nederland


Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:
Esperanto Nederland Ledenadministratie
Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord

En la numero

Nederlando **5**
- Kune en Veghel por la Kultura Tago 6
- Aventuroj pri la transportado de la Esperanto-tajpilo 7
- Kvar esperantistoj kotumis 8
- NEJ vizitis Roterdamon 9
- *Fenikso* rekomendas: *De Schatkamer* 10

Internacie **11**
- Forpasoj 11
- Varmegaj impresoj el la 111-a Universala Kongreso 12
- Oni povas iri tien sola, sed oni neniam estas sola 15
- Ans Bakker-ten Hagen Honora Membro de UEA 15

Ceterajĝoj **16**
- Hetajro, kiu mem difinas la regulojn 16
- Invito al la 7-a Virtuala Kongreso de Esperanto 18
- Ĉu eblas fari suneklipson per pato? 19
- Revuo-interŝanĝo 20
- Esperanta kuirarto 21
- Enigmo 22









Sur la kovrilpaĝo

Foto: Yves Nevelsteen

La 13-an de junio okazis la Kultura Tago en Veghel. Ĝi estis interesa tago pri kiu vi povas legi raporton sur **paĝo 6**.

Voorwoord

Deze vierde *Fenikso* van 2026 staat weer vol met nieuws uit binnen- en buitenland, én een nieuwe culinaire rubriek. In *Nederland* vind je in de eerste plaats een verslag van de *Kultura Tago* in Veghel op **pagina 6**. Daarna vind je nieuws over de overhandiging van het Esperanto-toetsenbord aan het Mechanisch Erfgoed Centrum in Dronten (zie **pagina 7**).

Paweł ging op 6 september wadlopen met andere leden van Esperanto Nederland (**pagina 8**) en Thijs haakte aan bij een dag van de Nederlandse Esperanto Jongeren in Rotterdam (**pagina 9**). Beeld en Geluid maakte eerder dit jaar de *Schatkamer* toegankelijk voor het publiek. Ook over Esperanto kun je er fragmenten in terugvinden (**pagina 10**).

Onder *Internacie* vind je drie overlijdensberichten van internationaal belangrijke esperantisten (**pagina 11**). Het *Universala Kongreso* vond dit jaar in Graz plaats. An Olijslagers en Bert de Wit gingen erheen en schreven er allebei over (**pagina's 12-15**). Ans Bakker-ten Hagen is tijdens het UK benoemd tot erelid van de UEA. Daarover vind je een artikel op **pagina 15**.

Naast de gebruikelijke rubrieken vind je vanaf deze *Fenikso* onder *Ceterajĝoj* een verrukkelijke, nieuwe kookrubriek: *Esperanta kuirarto*. In deze eerste editie vind je een recept voor Białystokse broodjes (zie **pagina 21**). Op 26-29 november vindt het *Virtuala Kongreso* weer plaats, daarvoor staat op **pagina 18** een uitnodiging.

We wensen je weer veel leesplezier met deze *Fenikso*!

Paweł en Thijs

De la estraro

La estraro kunvenis trifoje: la 9-an de junio, la 7-an de julio kaj la 1-an de septembro.

La estraro dankis al An Olijslagers pro la organizado de la partopreno de Esperanto Nederland en la Movada Foiro en la Universala Kongreso en Graz. An organizos kun aliaj ankaŭ la Beneluksan Kongreson en Eindhoven en 2027. Ŝi jam rezervis 80 lokojn en la hotelo StayOK. La kongreso daŭros de la 17-a ĝis la 19-a de septembro 2027. Multo jam estas preparita. La estraro volonte kontribuos per ideoj.

An mem iniciatis la organizadon de la Beneluksa Kongreso. Esperanto Nederland ne kunorganizas ĝin oficiale, sed kompreneble diskonigos informojn pri ĝi en la retejo, *Fenikso* ktp. Eble ni povos kontribui al la programo, sen financa respondeco pri la kongreso.

UEA financas la katedron en la Universitato de Amsterdamo (en kiu laboras prof. Federico Gobbo). Esperanto Nederland kontribuas monon al UEA per donacoj ricevitaj specife por la katedro. La kontrakto de UEA kun la Universitato de Amsterdamo finiĝos en 2029. Ekzistas iom da zorgoj pri tio, kiel daŭros la financado de la katedro poste. La prezidanto de Esperanto Nederland jam kontaktis kelkajn estraranojn de UEA. Sed la katedro ne estas nur nederlanda afero. Federico Gobbo estas la sola profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto en la tuta mondo. Novaj donacantoj por la katedro estas serĉataj. Per la donacoj via imposto malpliiĝos.

La formularojn por la ANBI-donacoj al nia asocio kaj la katedro ĝis nun eblis kompletigi nur surpapere kaj manskribite. Tio estos ŝanĝita kaj ekzistos komputilaj formularoj en la retejo.

Pro tiucela donaco eblos al junuloj ĝis 18 jaroj aliĝi al la studosemajnfino kontraŭ € 50. En 2027 la kotizo por plenkreskuloj iĝos € 120 (por membroj € 110). Jam 26 personoj aliĝis por novembro 2026.

La studosemajnfinoj en 2027 okazos de la 26-a ĝis la 28-a de marto (Pasko!) kaj de la 5-a ĝis la 7-a de novembro. Nova organiza teamo ekfunkcios en 2027; la nova teamo jam partoprenos en la ĉi-novembra studosemajnfino. Ni serĉas volontulojn por kuirado.

La jarkunveno en 2027 okazos la 10-an de aprilo en De Kargadoor (Utrecht).

Ni serĉas por la jaroj ekde 2027 novan sekretarion por Esperanto Nederland. Ankaŭ protokolanto de la estrarkunvenoj estas bonvena. Kandidatoj povas jam nun partopreni en la estrarkunsidoj.

Rob Groeneveld
sekretario

Forpasoj

S-ino **Ina van der Kamp – ten Hagen** forpasis la 27-an de majo en la aĝo de 81 jaroj. Ŝia loĝloko estis Amsterdam.

S-ino **Ruth Richardson** forpasis la 19-an de junio en la aĝo de 83 jaroj. Ŝi loĝis laste en Santpoort. Amikoj memoras, ke ŝi estis entreprenema, energia virino.



Ina van der Kamp – ten Hagen

Bonvenon!

Er zijn 4 mensen lid geworden sinds het vorige nummer.

- **Albert van Uden** woont in Hilvarenbeek. Hij heeft deelgenomen aan het laatste studieweekend.
- **Nella Scholtens** woont in Groningen.
- **Christoffer van der Werf** woont in Heerlen.
- **Jasper Sprengers** woont in Heeze. Hij heeft Esperanto geleerd toen hij jong was en komt naar het studieweekend in november.

Allen welkom! Wij hopen nader kennis met jullie te maken tijdens het studieweekend van 6 t/m 8 november in Krikkenhaar.

Bij Ineke Emmelkamp staat een kratje met tweedehands boeken. Leden kunnen van haar de lijst krijgen. Je kunt dan zelf uitzoeken wat je wil hebben; je betaalt alleen de verzendkosten.

Leden kunnen ook, tegen verzendkosten, een exemplaar krijgen van het boek “Esperanto – grammatica met oefeningen”. Stuur een mailtje naar ✉ **informado@esperanto-nederland.nl**.

Rob Groeneveld
secretaris Esperanto Nederland



Over het boek

Esperanto. Grammatica met oefeningen
Roel Haveman,
Arjen-Sjoerd de Vries
ISBN: 9789062831449

Gratis voor nieuwe leden.

Fenikso en viaj telefono kaj librolegilo

Fenikso estas la revuo de Esperanto Nederland kaj ĝi aperas surpapere, sed iom poste ĝi estas ankaŭ elŝutebla en la asocia retejo kiel PDF-dosiero. Pro la ŝanĝiĝantaj legokutimoj, la redakcio intencas ebligi legadon de la revuo en nova formo. Ni tute **ne** intencas ĉesigi la aperigon de la papera revuo kaj ankaŭ la PDF-dosieroj daŭre aperados. Tamen por tiuj, kiuj preferas legi la revuon elektronike, ni volas proponi novan formaton: EPUB. Tiu formato estas taŭga por komforta legado en la poŝtelefono, (tabul)komputilo kaj librolegilo. En la EPUB-formato aperas jam i.a. la revuoj *Monato* kaj *La Ondo de Esperanto*. Tiu formo, kiu devus ekzisti paralele al la ĝisnuna PDF-formato, havas diversajn avantaĝojn: oni povas ekzemple mem elekti la litertiparon kaj ĝian grandecon. Tio estas oportuna ankaŭ – sed ne nur – por la vidhandikapitoj, kiuj povas cetere pli facile laŭtlegigi la enhavon.

Pretigo de la nova formo kostas multe da tempo kaj laboro, tial antaŭ ol komenci, ni ŝatus trovi kelkajn testantojn kaj proponi al ili provversion. Viaj komentoj estas tre bonvenaj kaj povas helpi la aliajn legantojn en la estonteco! Ni serĉas kelkajn personojn, kiuj ŝatus ricevi la provan dosieron kaj malfermi ĝin en unu aŭ pluraj aparatoj: poŝtelefono, tabulkomputilo, komputilo, librolegilo. Ni ĝojus, se ni povus kontroli la funkciadon en diversaj operaciumoj (iOS, Android, Mac, Vindozo, Linkuso) kaj librolegiloj (Kindle, Kobo, PocketBook, Onyx). Se vi pretas helpi, bv. sendi mesaĝon al la redakcia retadreso: ✉ **redakcio@esperanto-nederland.nl**.

Kune en Veghel por la Kultura Tago

Intertempe la Kultura Tago kreskis al la pinta momento de la jaro por la nederlandaj esperantistoj. Unu fojon jare ni renkontiĝas kelkdekope por kune pasigi la tagon. Intertempe ni babilas – ofte, sed bedaŭrinde ne ĉiam – en Esperanto, aŭskultas prelegojn, kantas kaj ĝuas diversajn aktivaĵojn.

La 13-an de junio 2026 An Olijslagers gastigis nin en Veghel. Ni renkontiĝis en la konstruaĵo de danclernejo, en la salono kun taŭga nomo: *Dancing Queen*. Apud la prezidanto de Esperanto Nederland bonvenigis nin skabeno pri kulturo. Post lunĉo – varma supo kaj sandviĉoj – ni estis pretaj por ekskursi. La granda grupo dividiĝis en du: iom malpli granda parto iris al la ĉokoladfabriko (*The Chocolate Factory*), la aliaj decidis viziti la insektoĝardenon *Het Geerbosch*.

La insektoĝardeno iom surprizis la partoprenantojn. Ĝi estis fakte mezgranda kampo, ĉirkaŭita de arboj, sur kiu kreskis granda abundo da florantaj plantoj. Ili estis tiel elektitaj kaj lokitaj, ke ili logas diversajn insektojn. En kelkaj lokoj staris ankaŭ la karakterizaj t.n. insektohoteloj, kiuj servas kiel hejmo por pluraj specioj. La volontulo de la ĝardeno ĉiĉeronis nin, donis abundajn klarigojn kaj respondis demandojn de la grupo. La interpretadon profesie prizorgis Bert de Wit, kiu neniam hezitis, eĉ ĉe nomoj de plantoj kaj bestoj!

"Mi neniam antaŭe vidis tian abundon da junaj floroj de tia diverseco", skribis poste Marilyn Droog el Belgio. "Mi dirus, ke mi neniam imagis, ke ĉi tiu sperto, la malkovro de tia diverseco, estus tiel altvalora por mi. Estis TRE granda malkovro. Agrablega ĝojo: diverseco de insektoj, kaj de vivmanieroj, diversecoj de plantoj, de koloroj, de malpezecoj, altecoj ktp. Mallonge, amaso da diferencoj, por subteni vivon (de insektoj, plantoj kaj arboj, kaj finfine nia propra)!"

Post la ekskursoj la du grupoj revenis al la danclernejo. La loko finfine servis ankaŭ sian ĉefan celon: ni ricevis du mallongajn lecionojn pri dancado de salso! Profesia instruisto pri dancado donis klarigojn kaj kuraĝigis homojn, tiel ke post kelkaj minutoj eĉ ŝajnaj mallertuloj vigle movis la piedojn laŭ la ritmo de muziko.

Ni redonu la voĉon al Marilyn: "Mi ne nur lernis pri la natura vivo, sed ankaŭ relernis post ĉirkaŭ dek jaroj kiel danci salson. Ankaŭ salso estas kulturo, ĉu ne? Estis ŝanco por ni ĉiuj senti nin iom pli junaj. Mi eĉ vidis iun, kiu aspektis 20 jarojn pli juna ol mi, kun kelkaj ŝvitgutoj en la anguloj de la okuloj kaj larĝa rideto. Tio pruvas al mi, ke kulturo ne temas nur pri muzeoj, sed estas ĝojo!"

La sekva Kultura Tago okazos la 5-an de junio 2027 en Wolvega. Ankaŭ vi ne mankos tie, ĉu?



Grupfoto. Foto: An Olijslagers



Libroservo. Foto: Yves Nevelsteen

Aventuroj pri la transportado de la Esperanto-tajpilo

En *Fenikso*, n-ro 4/2025 aperis informo pri la tajpilo kun Esperanta klavaro kiun la Muzeo de Mekanikaj Heredaĵoj en Dronten volis akcepti por sia kolekto. Sed restis la problemo pri tio, kiel transporti la tajpilon al la muzeo en Dronten el kie ĝi estis en tiu momento: Dordrecht. Nu, mi havis ankoraŭ unu liber-vojaĝ-tagon de la finiĝanta abono ĉe NS kaj mi decidis uzi ĝin por tiu celo sabaton, la 11-an de oktobro 2025.

Mi sciis, ke la (elektra) tajpilo pezas 3 ĝis 4 kilogramojn, do marŝi kun ĝi ne estis opcio. Mi do decidis lui biciklon de la publika transporto (*OV-fiets*) – kaj en Dordrecht, kaj en Dronten. Eventiĝis, ke mi ne povis veturi de Leiden Centraal al Dordrecht tra Den Haag pro la laboroj ĉe la fervojo ĉe la stacio Mariahoeve kaj mi devis iri tra Alphen aan den Rijn kaj Gouda.

Do, mi iris per mia biciklo de mia hejmo en Leiderdorp al la stacidomo de Leiden-Lammenschans por preni la trajnon al Alphen aan den Rijn, ne konsciante ke mi revenos de Dronten al la alia stacidomo de Leiden: Leiden Centraal.

En la stacidomo de Dordrecht mi facile luprenis *OV-fiets* kaj iris al la indikita adreso. Tie oni afable akceptis min en la domo de amikoj de la donacinto kaj regalis min per tipaj al Dordrecht cinamobulkoj. Estis malgranda ceremonio de la transdono de la Esperanto-tajpilo de la donacinto al Esperanto Nederland. Post nelonge mi reiris al la stacidomo kun la tajpilo en la korbo ĉe la stirilo de la biciklo.

La *Eurocity direct*, kiu normale iras rekte al Lelystad, ne iris tiun ĉi tagon kaj mi devis ŝanĝi en Amsterdam Zuid. Pro eraro mia en Amsterdam Zuid aldoniĝis horo da veturo…

En Lelystad mi prenis la trajnon al Zwolle por veni en Dronten. Tie, ĉe la gardejo de *OV-fiets* mi devis teni mian *OV-chipkaart* kontraŭ la fenestreto por ekhavi la *OV-fiets*, sed aperis la mesaĝo, ke ne estis disponeblaj bicikloj… Verŝajne pro eraro en la sistemo. Mi sciis, ke estus marŝado de preskaŭ unu horo kaj duono… Kaj tio kun peza tajpilo! Do, mi telefonis al la muzeo, ke oni venu preni de mi la tajpilon. Sed neniu reagis…

En la kafejo-restoracio *Bij Broers*, kiu troviĝis sur la stacidomplaco, mi demandis ĉu oni povus pruntedoni biciklon, sed ili ne havis kaj neniu povis konduki min al la muzeo per aŭto. Restis al mi demandi al la ĉefo, ĉu mi povus lasi la tajpilon ĉe ili; kaj mi telefonus lundon al la muzeo, ke ili prenu la tajpilon de *Bij Broers*. Bonŝance la ĉefo konsentis! Fakte, post kelkaj tagoj mi sukcesis kontakti la muzeon kaj oni efektive aranĝis la transprenon de la tajpilo ĉe *Bij Broers*.



Solena transdono de la tajpilo.

La hejmenvojaĝo efektive reportis min al la stacidomo Leiden Centraal, sed mia biciklo… estis ĉe Leiden Lammenschans! Do, mi prenis la trajnon al Alphen aan den Rijn. En la trajno sidis apud mi vojaĝantoj parolantaj pri iu *Cosplay*-evento en Amsterdam. Distriĝinte pro tio mi forgesis eliri ĉe Leiden-Lammenschans kaj alvenis en Alphen aan de Rijn. Tie mi devis longe atendi la trajnon returne al Leiden… Mi renkontis junulon vestitan militiste kaj mi demandis lin, ĉu li devus reiri al sia kazerno tiun vesperon. Sed li respondis ke tio estis lia vestaĵo pri la temo “malvarma milito”! Li ĉeestis la saman *Cosplay*-eventon kiel miaj kunvojaĝantoj en la antaŭa trajno!

Ĉirkaŭ la oka kaj duono mi estis hejme, post preskaŭ dek du horoj!

Kees Neeft

Kvar esperantistoj kotumis

Ĉi tiu ekskurso devis okazi en la unua semajno de junio, sed la organizantoj nuligis ĝin tiam pro malfavoraj veterkondiĉoj. Tial ni aliĝis por posta dato kaj fine la 6-an de septembro ni promenis kvarope tra la Vadomaro al Ameland: Patrick el Gent, Foppe-Klaas el Zutphen, Paweł el Rotterdam kaj mi – Harm el Wolvega. Foppe-Klaas tranoktis ĉe sia frato en Leeuwarden – Andries, multaj certe konas lin. Paweł kaj Patrick tranoktis en Wolvega, en mia domo. Ili alvenis la antaŭan vesperon kaj ni enlitiĝis frue, ĉar la venontan matenon ni devis ellitiĝi je la kvina.

De la marbordo en Holwert la surinsula monteto Het Oerd estas klare videbla. Tamen la ekskurso daŭris kvar horojn. La kvanto da ŝlimo inter la marbordo kaj la insulo grandiĝis dum la lastaj jaroj. Tial ni marŝis unue sur la bicikla vojo kaj tra paŝtejoj al la digo. Tie ni ŝanĝis niajn ŝuojn kaj iris en la blunigran ŝlimon. Kelkaj opiniis ĝin fetora, tamen mi ŝatas tiun odoron.

Do, ni ekmarŝis. Dume iuj helpis aliajn elŝlimiĝi kaj post unu horo ni paŝis sur sablon – niaj kruroj iĝis puraj, sed ili denove malpuriĝos tuj antaŭ la alveno. La spertuloj sciis tion. Ni travadis kelkajn navigkanalojn – la lasta estis tre profunda. La dorsosakojn tre alte ni tenis kaj ni atingis la celon en gloro.

Ĉar ni venis iom pli frue ol planite – ĉio iris bone, la vetero estis afabla, samkiel la akvo (19 °C), kun malmulte da vento – la gvidantino starigis nin en cirklo. Ŝi volis, ke ni estu tute silentaj dum unu aŭ du minutoj. Tiam ni spertis la silenton de la Vadomaro. Aŭdeblis nur la sono de la Vadomaro – la susura kraketo de ĉiaj konkoj kaj krustacoj, ŝi klarigis.

Alveninte, ni grimpis sur la monteton Het Oerd, ĝuis la pejzaĝon kaj pluiris al la plaĝo aliflanke de Ameland. Tie kelkaj naĝis en la surfo de la Norda Maro.

Ni preskaŭ maltrafis la pramon – iu klopodis mendi per sia poŝtelefono la prambiletojn. Li sukcesis, sed la kazo estus tute alia se tio daŭrintus eĉ unu minuton pli.

Ĉiuj revenis al siaj hejmoj – lacaj, sed kontentaj!

Harm Voortman



Lacaj post la marŝado, en la ĉaro al Nes.

NEJ vizitis Roterdamon







La 4-an, 5-an kaj 6-an de septembro 2026 okazis la *Wereldhavendagen* en Roterdamo. La jara okazo montras kaj prifestas la havenon de la urbo. Estas multaj prezentoj pri tio, kio okazas en la havenoj de Roterdamo. Ĉar la havenoj nun estas sufiĉe for de la lokoj kie loĝas homoj, tiu mondo kutime estas kaŝita por ĉiuj, kiuj ne laboras en la havenoj. Por entreprenoj kaj organizoj kiuj volas dungi novajn personojn, ĉi tiuj malfermaj tagoj estas bona eblo por prezenti sin kaj la haveblajn postenojn en la haveno.

Ni prenis boatvojaĝon de *Spido* tra la havenoj de Roterdamo kaj dum la vojaĝo povis spekti la prezentojn kiuj okazis. Ni ankaŭ bone povis vidi la urbon mem. Kiam ni revenis al la kajo, ni iris al superbazaro por aĉeti manĝaĵojn kaj poste al la parko ĉe la *Euromast* por tagmanĝi. La vetero estis nuba, iomete nuba, sed sufiĉe bona por manĝi subĉiele.

Kiam la sandviĉoj estis manĝitaj, ni piediris al la *Maritiem Museum* ĉe Leuvehaven. Tie ni povis senpage viziti la eksteran parton de la muzeo. Ni povis rigardi la ŝipojn kaj lerni pri la vivo surmare en la pasinteco. Sur iu fiŝboato estis viro kies patro apartenis al la lasta generacio kiu laboris sur la boato, li ĉiĉeronis nin kaj parolis multe pri la tiama vivo surŝipe. Poste ni vidis ŝipon kiu (kvazaŭ polvosuĉilo) helpis transporti grenon de ŝipoj al stokejo. Ni vidis lastan ŝipon kaj poste la oficiala programo estis finita kaj ni disiĝis. Mi iris hejmen de ĉi tiu interesa tago kun NEJ.

Thijs van Viegen




Fenikso rekomendas

De Schatkamer

En majo ĉi-jare la arkivoj de *Beeld en Geluid* malfermiĝis por la ĝenerala publiko. Per la retejo *De Schatkamer*, ĝi estas traserĉebla kaj grandparte spektebla kaj aŭskultebla. Ekzemple epizodoj de *Kreatief met Kurk*, *Floris* kaj eĉ programoj pri aktualaĵoj, kiel la ĵurnalo de la oka vespere aŭ ekzemple *Netwerk*. Se vi troviĝas en Nederlando, vi povas spekti kaj aŭskulti ĉion, kio estas trovebla en la retejo. Kompreneble la trezorĉambro estas utila ilo por ni, nederlandanoj, por esplori nian (televidan) historion aŭ por re-spekti aferojn konatajn de antaŭe. Sed ankaŭ por esperantisto ĝi montriĝas interesa fonto. Por esplori tion, mi enmetis la serĉvorton “Esperanto” kaj trovis plurajn interesajn fragmentojn.

Ekzemplo estas intervjuo el epizodo de la radioprogramo *Wat een taal* (Kia lingvo) de la 26-a de marto 1998. Ĝi estas konversacio kun Marc van Oostendorp, kiu tiam estis fariĝonta la unua profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo. Dum la konversacio li i.a. laŭtlegis fragmenton el traduko de *Hamlet* (vidu: **https://mallonge.net/282**).
En *De Schatkamer* troviĝas ankaŭ fragmento el *Middageditie* el septembro 1999 kun raporto pri kurso de Esperanto por estroj de indiĝenaj popoloj en Wassenaar. Tie ili lernis uzi modernajn teknikojn (interreton, retmesaĝojn ktp.) kaj Esperanton, por facile komunikiĝi kun aliaj homoj. Montriĝas, ke tio ĉefe utilis por ili pro la fakto, ke ili mem parolas proprajn lingvojn, kiuj ne estas parolataj ekster la popolo (vidu la fragmenton ĉe **https://mallonge.net/283**, ĝi komenciĝas je 23:26).

Inter la rezultoj troviĝas fragmento el *Jeugdjournaal* el 2008 pri Esperanto-kunveno por infanoj. Oni klarigas kio estas Esperanto kaj montras kelkajn ekzemplajn frazojn (**https://mallonge.net/284** je 02:36). Aliaj fragmentoj plej ofte montras, ke oni ne ĉiam pensas pri Esperanto kiel pri sukceso. La oftaj kritikoj pri Esperanto facile troveblas



La fragmento el Middageditie.



Infanoj parolas Esperanton en Het Jeugdjournaal.



Voor de vuist weg. *Willem Duis parolas kun sinjoro Punt pri Esperanto.*

en la arkivo. Ekzemple, ke la angla jam estas la lingvo por internacia komunikado aŭ – kiel en *Voor de vuist weg* el 1963 – ke ne povas ekzisti lingvo, kiu estas artefarite konstruita, ĉar tio estas kontraŭ la naturo de lingvo (vidu **https://mallonge.net/285**). Kelkfoje en fragmentoj homoj parolas pri la lingvo kiel kuriozaĵo, neserioza hobio.

Sed ĝenerale estas interese trafoliumi kaj malkovri “novajn” aferojn. Do, certe rekomendinda! *De schatkamer* troviĝas ĉe **https://schatkamer.beeldengeluid.nl** kaj Beeld en Geluid daŭre aldonos novan materialon.

Thijs van Viegen



Probal Dasgupta, preleganta en la Malferma Tago de UEA. Bildo: Ziko C en Wikimedia Commons

La 1-an de junio forpasis **Probal Dasgupta** (1953–2026), barata esperantisto kaj lingvisto, prezidanto de la Akademio de Esperanto. En la jaro 1980 li volontulis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Tri jarojn poste, en 1983 li iĝis akademiano kaj restis membro de la Akademio ĝis la morto, en la jaroj 2001–2016 kiel vicprezidanto kaj poste kiel prezidanto. Li estis ankaŭ prezidanto de UEA (2007–2013). Li aŭtoris kelkajn librojn, i.a. *Loĝi en homaj lingvoj* (2011), kaj ekde la unua numero (2007) kunredaktis la literaturan revuon *Beletra Almanako*. Postmorte, en la 111-a UK, li estis elektita Honora Prezidanto de UEA.

La 30-an de junio forpasis **Przemysław Wierzbowski** (1986–2026), pola esperantisto, longjara prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo. Li estis aktiva internacinivele, sed precipe loke – en la naskiĝurbo de Zamenhof, Bjalistoko. Li okupiĝis pri instruado de la lingvo, aŭtoro de *Konfuziloj* (2017) kaj tradukinto de kelkaj libroj el la pola, laste *Solaris* de Stanisław Lem (2021). Redaktis kaj enpaĝigis plurajn E-librojn eldonitajn en Pollando.

La 4-an de septembro forpasis **Geoffrey Sutton** (1947–2026), brita esperantisto, filologo kaj redaktoro. Aŭtoro de la anglalingva enciklopedio pri la Esperanta literaturo (*Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, 2008). Li laboris en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo kiel redaktoro de la revuo *Esperanto* (1984–1986). Pli frue li estis ankaŭ vicredaktoro de *El Popola Ĉinio* (1981–1982).

Varmegaj impresoj el la 111-a Universala Kongreso en Graco, Aŭstrio (1–8 aŭgusto 2026)

Graz (Graco) estas la dua urbo de Aŭstrio laŭ nombro da loĝantoj. Ĝi havas universitaton kun 60 000 studentoj. La urbo havas belajn monumentojn, la interno de la urbocentro estas oficiala monda trezoro de Unesko. En la kongreso oni cetere ankaŭ parolis pri tio kiel tri landoj povis akiri la permeson de Unesko nomi siajn Esperantaĵojn monda kulturtrezoro. La kongresejo estas bela monumento el la deknaŭa jarcento kaj la *Stefaniënsaal* (salono Zamenhof) en ĝia interno estas kutime uzata por koncertoj. La aŭstraj komponistoj "rigardas" vin de supre se vi sidas en la salono. Granda orgeno dominas la spacon kaj en la kongreso oni povis aŭdi koncerton per tiu orgeno fare de la juna orgenisto William Gross kaj kelkajn kantojn de la sopranulino Linda Le Nepveu. Cetere okazis vendrede tre bona prelego pri aŭstraj virinaj komponistoj, pri kiuj mi neniam aŭdis. Ne nur la vivhistorion de tiuj komponistinoj oni aŭdis, sed ankaŭ fragmentojn el sonatoj kaj simfonioj de ili komponitaj.

Al la kongreso aliĝis ĉ. 1140 personoj el pli ol 62 landoj. Menciindas ke dum la kongreso Ans Bakker fariĝis honora membro de UEA, samkiel Paul Peeraerts. Dum la ferma ceremonio Tianjina Esperanto-Asocio ricevis Diplomon pri Elstara Agado. I.a. okaze de la jaro de ĉevalo kontribuis al tiu agado prof. Federico Gobbo (kaj via raportinto). La kongresa kuriero estas legebla rete ĉe **uk.esperanto.net/2026/kuriero**. Oni povas trovi tie ankaŭ la kongresan foton en la *Stefaniënsaal*.

Graz estas inter esperantistoj konata pro la fakto, ke jam antaŭe okazis tie Esperanto-kongresoj. En Graz troviĝas *Esperantoplatz* (Esperanto-placo) kaj Esperanto-monumento kiu datiĝas de la tagoj kiam Ivo Lapenna provis starigi t.n. neŭtralan movadon, konkurencan al UEA.

Nun la esperantistoj plantis arbon (platanon) en la urba parko, kiu espereble postvivos la sekan periodon kiu trafis ankaŭ tiun parton de Aŭstrio. Mi notis, ke en la urbo estas diversloke arbustoj kaj arboj kiujn oni eĉ en varmegaj cirkonstancoj provizas per sufiĉa akvo. La temperaturoj en tiu semajno estis inter 34 kaj 37 ℃, sed feliĉe en la kongresejo kaj en la busoj estis klimatiziloj.

Mi partoprenis tri ekskursojn: unu al *Stift Rein* (abatejo) kaj la subĉiela muzeo en Stübing (merkrede) kaj dua al stratarto en Graz (vendrede). La tria estis la gvidata Graz-ekskurso en dimanĉo, kun amuza traduko far s-ino Schlapsi.

Pri la vizito al *Stift Rein*: plej malnova benediktana kaj poste cisterciana abatejo fondita en la 12-a jarcento. Interese estas, ke la monaĥoj produktis sufiĉe da manĝaĵoj kaj medicinaĵoj por si mem kaj aliaj. La baroka preĝejo en la abatejo estas konstruita sur la bazo de pli malnova preĝejo en la 17-a jarcento. Ni vidis la internon de la abatejo kaj la preĝejo kaj unu el la monaĥoj en la preĝejo preĝis Patro Nia kun kristanaj kongresanoj. Estas multaj libroj malnovaj



*En la salono Zamenhof de la kongresejo (*Stefaniënsaal*) antaŭ la malfermo.*



La baroka interno de la preĝejo de Stift Rein *(abatejo).*

en la monaĥejo, kiuj estas bone prizorgataj de la restantaj ok monaĥoj. En la ejo estis ekspozicio “Flora et Labora” pri la ĝardenoj kiujn la monaĥoj havis dum la jarcentoj (kaj kiel tio ŝanĝiĝis).

La subĉiela muzeo en Stübing prezentis plurajn domojn el la antaŭa tempo el diversaj regionoj de Aŭstrio. Ni ricevis klarigojn pri la iloj kiujn la kamparanoj uzis kaj la produktoj kiujn ili vendis. Apud la domoj estis malgrandaj ĝardenoj de la domposedantoj. Ni vidis kiel aspektas la plej pompa ĉambro en la kamparana domo, en kiu oni akceptis ekzemple aŭtoritatojn kiuj kontrolis la enspezojn (imposto!). Ankaŭ la malnova akvomuelejo apartenas al la muzeo. Oni povas aĉeti malnovspecajn dolĉaĵojn porinfanajn kaj oni montris malnovmodajn sapomarkojn ktp. Same kiel en *Openluchtmuseum* en Arnhem. Malgraŭ la varmego ni tamen povis ĝui la klarigojn de la loka gvidanto, lerte tradukitajn de Lars.

Pri stratarto: La ekskurso ne okazis en la centro de la urbo, ĉar tie oni ne deziras grafitiojn. Nur en la parto, kie ne loĝas la plej riĉaj homoj. De la ponto ni sekvis la vortojn kiuj troviĝas sur la trotuaro kaj estas prenitaj el libro de rabeno kiu dum *Kristallnacht* (Kristala nokto; la detruo de judaj butikoj kaj sinagogoj en novembro 1938) estis grave vundita kaj lasita de la nazioj por morti, sed tamen postvivis kaj sukcesis eskapi al Britio. En la kvartalo okazis konkurso de grafitiaj famuloj el diversaj landoj. Oni vidas la murpentraĵojn de pluraj el ili, i.a. de artisto el Bosnio-Hercegovino, kiu atentigas per la nombro sube pri la viktimoj de genocida murdo en la naŭdekaj jaroj en Srebrenica.

Kelkaj murpentraĵoj estas faritaj laŭ bezono de loka loĝanto aŭ la urbestraro. La maldekstra urbestraro volis senigi sin de iuj nomoj de faŝismemuloj el pasinteco, kiuj estis ankoraŭ en la stratnomoj, kaj tiel estiĝis strato memore al Maria Stromberger, kiu estis flegistino kiu memvole kuniris al koncentrejo Auschwitz por helpi kiom ŝi ankoraŭ povis. En preĝejo en la sama kvartalo ni vidis kiel konata grafitiartisto pentris la murojn de la preĝejo kaj ŝanĝis ankaŭ la internon, ekzemple per spegultegita kolono k.s.

La horon dediĉitan al la memoro de Rob Moerbeek gvidis Michaela Lipari. Parolis Otto Prytz (pri la blindaj geesperantistoj), Brian Moon (pri Rob en la komitato de UEA) kaj iu de la vegetarana asocio. Oni laŭtlegis la omaĝon fare de Jan Bemelmans kaj oni montris la filmitan



La afiŝo de la kongreso.



Esperantoplatz *(haltejo de la tramoj).*

omaĝon fare de Marc van Oostendorp. Komence estis mallonga filmeto en kiu Rob parolis pri diversaj aferoj, sidante en la Biblioteko Hector Hodler.

Ankaŭ Kajto grave kontribuis al la kongreso per sia konata repertuaro, sed surprizis nin per novaj kantoj, kiuj estiĝis el tute aparta kunlaboro de Kajto kun la franca bardo Marcelo Redoulez kaj koreaj geesperantistoj. Tiel rezultis la "interkultura kaj teatra spektaklo" en la ĵaŭda vespero sub la titolo "sorĉe de verda stelo", kiu daŭris unu kaj duonan horojn. Kajto kantis ankaŭ kun la koreanino (sopranulino) Amira Chun (Chun Kun Ok).

La kongresa temo estis pri volontula laboro rilate al "daŭripova evoluigo". Mi ĉeestis du kunsidojn, sed mi kredas, ke la temo estas tro granda por trakti ĝin en bona maniero. Cetere mi jam antaŭe esprimis mian opinion, ke la termino "daŭripova evoluigo" (mi dirus: daŭrigebla aŭ daŭriginda disvolvo) ne reflektas la norman karakteron de la koncepto, kiun oni diversmaniere povas interpreti. Oni baraktas por ion diri pri la diversaj (17) temoj, en kiuj la UN-komisiono disigis la koncepton, kiu fakte devus esti traktata integre laŭ socia, ekonomia kaj medio(natur)protekta vidpunktoj. Tia divido estas taŭga maniero laŭ mi por garantii malefikecon de la rekomendoj.

Cetere, UEA jam publikigis gazetaran komunikon pri volontula laboro okaze de la Tago de Esperanto, la 26-a de julio: **uea.org/gk/1312a1**



Stratarto: pando kiu kaŝiĝas duone sub hedero.

Okazis multaj prelegoj pri sciencaj temoj, kiel IKU-prelego, aŭ kiel prelegoj en la scienca kafejo aŭ en SUS (Scienca Universitata Sesio). La libro kun la prelegoj, ilustrita, estas havebla kontraŭ nur 19 eŭroj. Ĝi enhavas i.a. la prelegon de Bert de Wit, pri ĝardenstiloj tra la jarcentoj kaj tra la mondo.

Estis multaj volontuloj (kaj aŭstraj kaj alilandaj) kiuj helpis ĉe la kongresaktivaĵoj. Bedaŭrinde ne povis okazi paralele la tradicia tutsemajna infana kongreseto. Tion la gepatroj eksciis nur lastmomente.

Venontjare la Universala Kongreso okazos en Aŭstralio kaj oni reklamis ĝin dum ĉi-UK. Cetere, venontjare okazos ankaŭ Eŭropa Kongreso apud Marsejlo en Francio, dum Pentekosto.

Bert de Wit

Kajto distingita en la UK en Graco

En la Solena Fermo de la UK okazis disdono de diplomoj pri elstara agado kaj elstara arta agado por la jaro 2026. Inter la distingitoj pri arta agado estis Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma, kiuj kune muzikumas kiel Kajto.

Ekde la fino de la 1980-aj jaroj ili popularigas Esperanton per vigla popolmuziko, maristaj kantoj, kanonoj kaj originalaj komponaĵoj, kun vasta internacia koncertagado kaj pluraj albumoj. Post la origina kvaropa periodo ili daŭrigis kiel duopo Kajto, konservante kaj renovigante unu el la plej konataj repertuaroj de Esperanta muziko. Ilia laboro, jam distingita per la FAME-kulturpremio en 2004, dum jardekoj kontribuis al la kultura prestiĝo, komuna kantado kaj internacia videbleco de Esperanto.

Oni povas iri tien sola, sed oni neniam estas sola

Ni iris duope per nokta trajno de Essen (Germanio) al Graz. La trajno jam malfruis du horojn kaj sekve ni maltrafis nian sekvan trajnon en Salzburg venontmatene. Ni povis ŝanĝi nian bileton kaj iri per la sekva trajno, sed ĝi estis plenplena. Feliĉe ni tamen trovis sidlokojn. Do, ni alvenis kun tri kaj duona horoj de malfruo. Sed ni tamen povis ĉeesti la Movadan Foiron, kie mi reprezentis Esperanto Nederland kun du aliaj volontuloj. Mia krokodilo ricevis multe da atento (kion ĝi tre ŝatis!), kaj ankaŭ la nederlandaj *dropjes* estis sukcesaj. Nur la azianinoj ne ŝatis ilin. Dum la semajno mi partoprenis tri ekskursojn:

- Lunde mi esploris Graz (Panoramo de Graz) kaj vizitis la kastelon Schlossberg. La ĉiĉerono multe rakontis pri la historio de la kastelo.
- Merkrede ni iris buse al Maribor (Slovenio). Partoprenis preskaŭ 90 personoj. La urbocentro estas tre bela kaj havas riĉan historion. Ni vizitis ankaŭ "Jeruzalemon" kaj la malnovan urbeton Ptuj.
- Vendrede mi partoprenis en la ekskurso al la kastelo Eggenberg.

En la kongresejo mem mi sekvis kelkajn sciencajn prelegojn. Sed la plej impona estis la solenaj inaŭguro (dimanĉe) kaj fermo (sabate) en la tre bela kaj riĉe ornamita koncertejo, tiusemajne nomata Zamenhof-salono. La reprezentantino de la urbo estis tre entuziasma kaj eĉ parolis al ni en Esperanto. En la Zamenhof-salono okazis ankaŭ la koncertoj kaj la tradiciaj nacia kaj internacia vesperoj. Mi esploris ankaŭ iomete la urbon Graz mem. Estis facile trovi restoraciojn en la ĉirkaŭaĵo de la kongresejo. Ĉiuvespere mi manĝis kun alia grupo de konatoj: nederlanda grupo, belga grupo, germana grupo. Iam mi lunĉis eĉ kun nekonata esperantisto. Estis franca vidhandikapulo kun du akompanantoj. Ili ne parolis Esperanton, sed raportis al la viro, ke tie kaj tie sidis esperantistoj. Li komencis babili kun mi kaj finfine mi sidis ĉe ilia tablo por manĝi kaj babili. Tio estas la ĉarmo de internacia kongreso: oni povas iri tien sola, sed oni neniam estas sola (krom se laŭ propra elekto). Mi tre ŝatis la tutan semajnon, krom unu grava afero: ĉiutage estis 35 ĝis 38 gradoj! Tro varme por multe fari, sed en la kongresejo estis sufiĉe freŝe. Eble estas bona ideo iri al Melburno venontjare, ĉar la kongreso okazos en la (sudhemisfera) vintro. Mi ankoraŭ pripensos...

An Olijslagers

Ans Bakker-ten Hagen – Honora Membro de UEA

Ans Bakker-ten Hagen (n. 1941) estis elektita en la Universala Kongreso en Graco kiel Honora Membro de UEA. Ŝi estas dumviva membro de UEA kaj dumviva patrono de TEJO. De pli ol kvar jardekoj ŝi apartenas al la plej fidelaj kaj sindediĉaj subtenantoj de UEA, precipe en la kampoj de administrado, financoj kaj organiza evoluigo.

Inter 2001 kaj 2013 ŝi estis komitatano A de UEA kaj inter 2001 kaj 2007 ŝi servis ankaŭ kiel estrarano respondeca pri financoj kaj administrado. Dum tiu periodo ŝi aktive kontribuis al la modernigo kaj stabiligo de la administra laboro de UEA. Ans Bakker-ten Hagen dum pli ol 20 jaroj estas membro de Societo Zamenhof kaj konstanta mecenato de UEA. Ŝi partoprenis en almenaŭ 29 UK-oj inter 1982 kaj 2024 kaj estis ano de la Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK-oj) de la UK-oj en Roterdamo – en 1988 kaj 2008. Aparte grava estis ŝia rolo en Institucio Hodler '68, kies laboron ŝi dum multaj jaroj kunordigis kaj subtenis ĝis la transdono de la havaĵoj de la institucio al UEA.

Per sia longdaŭra organiza laboro, fidela subteno al UEA, sindediĉo al la financa fortigo de la Asocio kaj kontribuo al Institucio Hodler '68, Ans Bakker-ten Hagen dum jardekoj laboris por stabileco kaj evoluo de UEA, ofte sen serĉi publikan rekonon.



Hetajro, kiu mem difinas la regulojn

La Esperanta literaturo estis, eble eĉ pli ol la naciaj literaturoj, afero de viroj. Tamen ankaŭ virinoj verkis en Esperanto. Unu el la plej konataj estis la ĉeĥino Eli Urbanová (1922–2012). Ŝi estas samtempe unu el la plej interesaj verkistoj de tiu malgranda, mirinda literaturo: tre memstara spirito kun tute propra voĉo, kiu ŝajne malmulte zorgis pri konvencioj. Lastatempe mi relegis tri el ŝiaj libroj: la debutan poemaron, la romanon kaj la lastan poemaron.

Nur tri kolorojn

Ŝia komplika amvivo ĉiam rolas en ŝia verkaro. En la debuta kolekto *Nur tri kolorojn* (1959) ĝi aperas ankoraŭ iom kaŝite, sed unu sekcio de la libro jam portas la titolon *Hetajro dancas*. Estas amo, eĉ orgioj. Sed kio faras tion bela, estas ke sub la surfaco ĉiam kuŝas profunda tavolo de malĝojo.

Prenu la poemon "Sekreto de urno". En angulo de salono staras vazo. Post ĉiu orgio la parolanto ĵetis en ĝin moneron, kaj iam ĝi gaje tintis. Nun, plena, ĝi silentas kiel graveda matrono. Enuante, la parolanto renversas ĝin sur la tapiŝon – "riĉa akuŝo" – kaj prenas la oron en la manojn: venu, sklavino, ĉio estas por vi.

Sekreto de urno

Ne nur por ornam' estas enangule
tiu bela vaz'; post orgi' regule
mi ĵetadis ja en senkulpan varon
unu denaron.

Iam tintis ĝi per tre gaja tinto.
Nun en truda mut' de tro-satiĝinto
pozas la amfor' en malluma fono
de la salono.

Dika jen matron' kun ventreg' graveda.
Tiel pensas mi, oscedema, teda,
kaj renversas ĝin sur tapiŝa pluŝo.
Riĉa akuŝo!

Flavkolora or' tra la manoj iras.
Strange; tia tint' kaj nenion diras.
Tien ĉi, sklavin'! Kial gard' envia?
Ĉio — la via!





Eli Urbanová. *Hetajro dancas. Chapecó*: Fonto, 1995.

Eli Urbanová. *El mia buduaro. Chapecó*: Fonto, 2001.

Se viro el la kvindekaj jaroj estus verkinta tion, oni povus nomi ĝin ludema, iom pikanta poemo. Sed ĝin verkis virino. Ĉu ŝi mem estas la sklavino? Ĉu ŝi mem estas la graveda virino? Ĉu tial la gaja tintado finiĝis? Ĉu tiuj orgioj vere estas tiel agrablaj por hetajro? Kion scias la amforo – kaj kial la titolo nomas ĝin urno?

Tiu aspekto troviĝas en multaj poemoj de la kolekto: supraĵe ili estas viglaj, foje iom pikantaj, sed se oni legas eĉ iomete pli atente, la malhelaj randoj fariĝas videblaj. La "tri koloroj" de la titolo do estas, laŭ mi, griza, nigra kaj pice nigra.

Hetajro dancas

Esperantistoj ĝenerale estas obstinaj homoj. Ili vivas inter aliaj homoj, kiuj ne komprenas, kial oni lernus lingvon kiun tiel malmultaj parolas. Por verki poemojn en tiu lingvo oni bezonas eĉ pli da persisto, ĉar esperantistoj, kiel plej multaj homoj, kutime ne legas poezion. Urbanová estis jam iom konata poetino, sed la aŭtobiografia romano *Hetajro dancas*(1995) estis ŝia sukceso.

Tio estas rimarkinda libro, unue pro la stilo. Ĝi konsistas el mallongaj ĉapitroj, pli-malpli kronologie ordigitaj, kiuj ĉiu montras alian aspekton de ŝia vivo, ĉiufoje en iom alia stilo. Ĉi tie laboras poetino: la prozo tiel atentas la lingvon, ke ĝi estas foje malfacile tradukebla. Ŝi ludas per vortoj kaj sonoj – *enamiĝo* kaj *emanas*, *pasio* kaj *pasos* – kaj aliloke ŝi skribas teatrece, aŭ ripetas linion kiel refrenon.

Sed la plej rimarkinda estas verŝajne la enhavo. Virino naskiĝinta en 1922 estis 73-jara en 1995, kaj ŝia temo estas ŝia amvivo, kiu por ŝi grandparte kunfalas kun ŝia seksa vivo. Pri ĉiuj viroj, kun kiuj ŝi rilatis, ni ekscias kiaj ili estis en la lito: la edzo Urban, sadisto; la granda amo Jan, kies tuŝoj levis ŝin al grandaj altoj; la tria amo Ernesto. Post la morto de Jan ŝi en komunisma Ĉeĥoslovakio eĉ elpensas propran seksilon el heredita irigatoro – la paĝoj kiuj plej proksimas al pornografio.

Tamen mi ne kredas, ke la verkistino volis eksciti iun. Ŝia intereso pri sekso estas por ŝi same memkomprenebla kiel ŝia intereso pri amo: nenio por senkulpigi aŭ kaŝi, sed ankaŭ nenio por longe detali. La maljuna sinjorino retrorigardas al vivo, en kiu ŝi ĉiam ŝatis sekson, nenio pli.

Simile feminismo ne ludas klaran rolon. Formale viroj kaj virinoj estis egalrajtaj en la komunisma Ĉeĥoslovakio, kvankam en la praktiko certe ne ĉio estis reguligita. Sed por Eli persone tio ne ŝajnas esti problemo. La viroj estas nefidindaj, aŭ tro drinkas, aŭ havas perversajn fantaziojn. Nu, tiel estas, kaj Eli neniel estas ilia viktimo. Eĉ sceno, en kiu konato pli-malpli perfortas ŝin, ne donas tian impreson – ĝi estas ĝena.

Egale memkomprenebla ŝajnas la elekto de Esperanto. Urbanová debutis ĉeĥlingve en la kvindekaj jaroj, sed poste verkis nur en Esperanto. Kial? Pri tio ŝi diras eĉ ne unu vorton; oni mem divenu. Eble ŝi pli ŝatis verki en ĝi, eble ŝi unuavice vidis sin internaciisto. Ŝi vivis en la rondo de la homoj kiujn ŝi konis. Komunismo, feminismo, la idealoj de la Esperanto-movado – ili ĉiuj tuŝis ŝin malpli ol kelkaj homoj ĉirkaŭ ŝi.

El mia buduaro

Kial homoj verkas poemojn en Esperanto? En sia lasta poemaro, *El mia buduaro* (2001), Urbanová tuŝas motivon kiu laŭ mi estas sufiĉe ofta: por ke la amato ne legu ĝin. En la poemo "Nur li neniam" la parolantino rakontas, ke laŭdire ŝi jam verkis sufiĉe, ke la verkado damaĝas ŝin, kaj ke li ne deziras ke ŝi verku pri li. Tial ŝi laboris pri la kolekto pli-malpli sekrete. Homoj en Italio, Brazilo kaj Kanado legos la odon – nur li neniam.

Nur li neniam

Laŭdire mi verkis sufiĉe da poemoj.
Laŭdire la verkado al mi damaĝas.
Laŭdire li ne deziras, ke mi verku pri li...

Jen kial mi laboris super la kolekto
El mia buduaroeres
pli malpli sekrete.
(....)

Kaj legos tiun odon homoj
en Italio, Brazilo, Kanado,
nur li neniam...

Ĝi estas unu el la malmultaj poemoj en la kolekto kiu ne rimas, kaj kiu krom la divido en versojn apenaŭ uzas klasikajn poeziajn rimedojn: odo al iu, kiu ne volas ke oni verku odojn al li. Kutime Urbanová rimis abunde, kio donas al ŝiaj poemoj – kiel la ideo mem de buduaro – ion klasikan, pli deknaŭajarcentan ol dudekunuajarcentan.

Legante tiun poemon izolite, oni povus supozi ke la poetino estis virino emanta cedi: se li ne volas, mi ne faras, aŭ nur kaŝe. Sed kiu konas la reston de ŝia verkaro, scias ke la afero estis pli komplika. Ŝia rilato al viroj konsistis el amo kaj volupto, el ŝia flanko, kaj la dependeco iris almenaŭ ankaŭ en la alia direkto. La hetajro ludas gravan rolon en ŝia verkaro – sed hetajro, kiu mem difinas la regulojn.

En *El mia buduaro* preskaŭ okdekjara hetajro retrorigardas. La "li" de la poemo estas la tria "princo" de ŝia amvivo, unu el ŝiaj tri grandaj amoj (krom sinjoro Urban, kun kiu ŝi dum kelka tempo estis malfeliĉe edziniĝinta). Ŝi adoris lin, korpon kaj spiriton. Sed por eviti problemojn, ŝi verkis sian odon al li en Esperanto.

Marc van Oostendorp

7-a Virtuala Kongreso de Esperanto

26-a ĝis 29-a de novembro 2026

La Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estas la plej granda reta evento por esperantistoj, organizata de UEA ĉiujare fine de la jaro ekde 2020. Pasintjare al ĝi aliĝis 1427 personoj el 95 landoj! La VK estas riĉa je interesaj prelegoj, artaj kaj kulturaj prezentoj kaj socia programo. Jen plia ŝanco esperantumi aldone al la Universala Kongreso de Esperanto!

Dum la VK, partoprenantoj de diversaj landoj interkonatiĝas, lernas ion novan dum la realtempaj diverstemaj prelegoj, partoprenas en kursetoj, atelieroj kaj diskutoj, ekscias pli pri la Esperanto-movado dum la Virtuala Movada Foiro, kaj multe pli!

La partoprenantoj de ĉiuj lingvoniveloj, spertoj kaj tempozonoj estas bonvenaj, ni certas, ke ĉiu trovos programerojn laŭ sia gusto. Aliĝu nun kaj spertu la internacian Esperanto-etoson!





Fascinaj prelegoj

Dum VK okazos pluraj realtempaj prelegoj, interalie pri la ĉi-jara ĉefa temo “Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo”. Dum la prelegoj vi povos starigi viajn demandojn al la prelegantoj.




Kursetoj, atelieroj, diskutoj

Krom prelegoj vin atendos multaj aliaj programeroj, dum kiuj vi povos partopreni aktive aŭ simple kiel spektanto – kursoj, retaj trejnadoj pri diversaj fakoj, paneldiskutoj, konversacioj kun famaj esperantistoj, prezentoj de novaj libroj, kaj multe pli!



Arta programo

Ne maltrafu koncertojn, artajn prezentojn, renkontiĝojn kun aŭtoroj kaj aliajn kulturajn programerojn, kiuj permesos ĝui la talenton de esperantistoj kaj ekkoni kulturojn de la tuta mondo.



Virtuala Movada Foiro (ViMF)

Same kiel dum la ĉeestaj Universalaj Kongresoj, pluraj Esperanto-asocioj kaj iniciatoj estas invitataj prezenti sin kaj sian agadon al ĉiuj kongresanoj. La Virtuala Movada Foiro (ViMF) okazos la 26-an de novembro, antaŭ la “kerna programo” – vidu la detalojn en la paĝo pri programo. Kandidatiĝu ĝis la 8-a de novembro, ĉar la lokoj estas limigitaj.



Konversaciejoj

Dum la tuta Virtuala Kongreso, 24 horojn tage funkcios laŭtemaj vidbabilejoj, kie vi povos renkonti aliajn kongresanojn kaj diskuti pri la proponita temo. Ili ne estas registrataj kaj ne havas gvidanton. Krome, estos ankaŭ ĝeneralaj konstantaj babilejoj sen temoj, kiuj funkcias dum la tuta evento. Tie vi povas babili kun aliaj pri io ajn, laŭ via plaĉo.


Ĉu vi estas individua membro de UEA? Aliĝu senpage ĝis la 15-a de novembro 2026! Se vi ankoraŭ ne estas IM de UEA, eblas samtempe aliĝi al UEA kaj al la VK. Aliĝu nun pere de la retejo: **vk.esperanto.net/2026/**

Ĉu eblas fari suneklipson per pato?

La ekstera atmosfero de la suno estas pli varma ol ĝia surfaco. Tiu t.n. korono ĉiam estas tie, sed la hela surfaco de la Suno tute superbrilas ĝin. Tamen, dum plena suneklipso, kiel la 12-an de aŭgusto ĉi-jare en Hispanio kaj Islando, la korono sin montras!

Rekta linio

La Luno devas ŝoviĝi inter la observanto kaj la Suno. Tio okazas kiam la lumigata flanko de la Luno forturniĝas de la Tero. Tamen ne ĉiu t.n. novluno rezultigas suneklipson, ĉar la orbito de la Luno estas klinita 5° rilate al tiu de la Tero. Tial la Luno plej ofte iras super aŭ sub la Suno.




Ŝajna grandeco

Laŭ tera vidpunkto, la luno devas esti iom pli granda ol la Suno. Por kalkuli tion oni uzas la angulan diametron δ.

$tan\left(\frac{1}{2}\delta\right)=\frac{r}{D} \implies \frac{1}{2}\delta \approx \frac{r}{D}$ (ĉe malgrandaj anguloj la tangento estas proksimume la angulo mem)

$\implies \delta \approx \frac{2r}{D} rad \implies \delta=\left(\frac{d}{D}*\frac{180}{\pi}\right)^{o}$ (180/π la konverta faktoro inter radianoj kaj gradoj)

δ = angula diametro, r = radiuso, d = 2r = diametro,
D = distanco.



		Suno	Luno
distanco	diametro	1392000	3474
	plej malgranda	147100000	363000
	mezuma	149600000	384500
	plej granda	152100000	406000
angulo	plej granda	0,54 °	0,55 °
	mezuma	0,53 °	0,52 °
	plej malgranda	0,52 °	0,49 °

Tabelo: datumoj pri la Suno kaj la Luno (km). Ju pli malgranda la distanco des pli granda la angulo. Bildo: la Luno estu sufiĉe proksima al la tero por kovri la tutan sundiskon.

datumoj (km) - 12 aŭgusto	suno	luno
diametro	1392000	3474
distanco	151600000	370000
angula diametro	0,53 °	0,54 °


Ĉar la orbitoj de la Tero kaj de la Luno ne estas perfektaj cirkloj, sed elipsoj, iliaj distancoj varias.
La kombinaĵo 0,54° kaj 0,49° neniam povas regali nin per *plena* suneklipso eĉ ne se la tri astroj formas perfektan linion. La rando de la Suno restas videbla (supre), dum 0,52° kaj 0,55° kondukas al plena eklipso (malsupre). Se eblus kaŝi la tutan sundiskon per pato el la kuirejo, kial mi atendu ĝis 2081?

Lumĵetado kaj nuboj

Nia atmosfero disĵetas la sunlumon en ĉiuj direktoj, precipe la bluan. Eĉ se vi tute kaŝas la sundiskon per la pato, la ĉielo restas luma, kaj superradias la koronon entute.

Alia problemo estas la vetero. Dum la eklipso, la ĉielo super Islando dense nubis. Ĉe ni eĉ ne unu nubo aperis kaj la Luno sufiĉe proksimis por kovri la sunon. Sed…

Ĉi tie la Luno ne estis perfekte inter ni kaj la Suno. Je la kulmino de la eklipso, la supra flanko de la suno ankoraŭ



videblis. La eskapinta lumo (12 %) de la ankoraŭ videbla sundisko superbrilis la koronon, kaj alportis ankoraŭ iom da lumdisĵeto. Malgraŭ tio: la spektaklo valoris la penon.

La suprajn fotojn mi mem faris, per poŝtelefono kaj nigra veldvitro. De maldekstre al dekstre: la komenco, mezo kaj fino de la eklipso.

Ekster la atmosfero vi ne havus disĵetadon nek nubojn. La astronaŭtoj de Apollo-Soyuz (1975 malsupre, maldekstre) kaj de Space Shuttle (1995 malsupre, meze kaj dekstre) sukcesis observi la koronon per artefarita eklipso.

Do, finfine: ĉu eblas fari suneklipson per pato?
Jes. Tio eblas en la spaco, sed ne sur la Tero!

Harm Voortman

Revuo-interŝanĝo



Benata Hengstmengel-Koopmans
benata@zonnet.nl

Revuo-interŝanĝo estas projekto por prezenti enhavon de aliaj revuoj.

Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda
https://www.satesperanto.org
januaro-marto 2026 (n-ro 1447–1449)

Vivo de SAT: Pri la SAT-kongreso en Leono (Hispanio), 19–26 julio 2026.

En *Tra la mondo* ni legas pri Irano: krimo post krimo kaj troaj komplicaj silentoj; Germanio/Aŭstrio: Palestino-solidareco kaj duobla moralo; Sirio: demokratio aŭ Islama ŝtato; Japanio: pri granda ŝanĝo en la japana politika mondo; Usono: pri la rolo de Gregory Bovino, kiel respondeculo de la usona agentejo ICE.

Nova Irlanda Esperantisto

Oficiala bulteno de Esperanto-Asocio de Irlando
n-ro 164: 2/2026

Pri la forpaso de Probal Dasgupta (1953–2026), kiu naskiĝis en Kolkato, Barato. Li estis lingvisto kaj leksika esploristo, membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983 ĝis la forpaso, kaj ankaŭ prezidanto de UEA en la jaroj 2007–2010.

Artikolo *Muzeo parolas en Esperanto*: temas pri Muzeo de Kalkulaj Iloj de la Universitato de Pizo (Italio), kiu havas aŭdgvidilojn en la internacia lingvo.

La Revuo Orienta

https://www.jei.or.jp/eo/
107-a jaro, februaro 2026, n-ro 2 (=1238)

En la rubriko *Akrevide, Akreflare*: kiel ni fosas nian sulkon? Ni legas la spertojn de germana studento en Japanio.

Anonco, ke la 59-a ILEI-kongreso okazos en Zaozhuang (Ĉinio), 10–17 julio 2026; kaj la 113-a Japana Esperanto-kongreso okazos en la urbo Chiba, 3–5 oktobro 2026 kun postkongresa ekskurso.

107a jaro, marto 2026, numero 3 (=1239).

“Okaze de la 111-a UK atendos vian viziton *La Verda Koro* de Aŭstrio de 1-8/8 en Graz (Stirio)”. Tie situas ankaŭ Esperanto-placo kaj monumento de Jasper Neergaard kun la nomo ‘La Espero’.

Kontakto

www.tejo.org/agadoj/revuo-kontakto
n-ro 327 (2026/1)

La jaro 2026 estas la Jaro de la Ĉevalo. Ĉi tie temas pri la transkultura spirito de galopado. La 82-a IJK de TEJO okazos en Tiana, Katalunio (Hispanio), 9-16 aŭgusto 2026. István Ertl verkas pri *Tiel la mondo… premias*.



2026 estas la Jaro de la Ĉevalo.

Monato

www.monato.be
47-a jarkolekto, junio 2026

Scienco: ‘Malpli da viando, pli da gušlegomoj’ en la artikolo pri sano; Julius Hauser verkas pri Artemis-2: ‘reveno de la homaro trans la limoj de tera orbito’; pri generacio X: ‘silenta ponto inter 2 disaj mondoj’. En la artikolo pri Norda Malio ni aŭdas opinion pri tuaregoj, ribelo kaj ŝtata malforto.

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio.
marto/aprilo 2026, n-ro 2/2026

La ĉefredaktoro estas Robert Kamiński, kiu cerbumas pri la ĝusta Esperanta vorto por ‘e-libro’; li preferas ‘bitlibro’. Pri Pasporta Servo: TEJO planas eldoni paperan libreton en 2026. Jam ekzistas reta adresaro: **pasportaservo.org**. Ulrich Lins skribas pri la forpaso de Roman Dobrzyński la 13-an de novembro 2025.



Roman Dobrzyński kaj la edzino Erika, fotitaj ĉe la kongresa balo en 1987 (okaze de la centjariĝo de Esperanto).

Prenu du temojn – la unuan: eventon el la riĉa historio de la Esperanto-movado, la alian: bongustan recepton – kaj tiel vi trafos nian rubrikon!



Bulketoj de Bjalistoko

Ni komencu de la naskiĝo de L.L. Zamenhof en Bjalistoko. La familio Zamenhof estis asimilitaj judoj. Kvankam la patrino venis de religia familio, kredo ludis neniun gravan rolon en la frua infanaĝo de Ludoviko. Sed li certe konis kaj manĝis ĉi tiun pladon.

Granda parto de la juda vivo en orienta Eŭropo estis neniigita de holokaŭsto, sed enmigrintoj en Usono kunportis la recepton de bulketoj el Bjalistoko, ringobulkoj.

Ingrediencoj por 12 bulketoj

- 400 gramoj da trikita faruno
- 7 gramoj da seka gisto
- 15 mililitroj da olivoleo
- 8 gramoj da salo
- 250 mililitroj da akvo
- Iom da olivoleo por brosi la bulketojn

Por la plenigo

Ŝaloto, ajlo kaj papavosemoj

Preparado

1. Metu la farunon, giston, olivoleon, salon kaj akvon kune kaj miksu ilin.
2. Knedu dum 12 minutoj ĝis vi havos glatan, iomete gluecan paston.
3. Formu pilkon el la pasto, metu ĝin en ŝmiritan bovlon kaj kovru la bovlon per malseketa tuko.
4. Lasu la paston kreski ĝis ĝi duobliĝos.
5. Premu la aeron el la pasto. Dividu la paston en 12 egalajn partojn kaj formu el ili bulketojn. Lasu ilin ripozi dum 5 minutoj.
6. Premu ilin per la manplato. Metu bakpaperon en la bakplaton.
7. Metu la bulketojn sur la bakplaton, surŝutu ilin per faruno, kovru la bakplaton per malseketa tuko kaj lasu la tuton por unu horo.
8. Dume, haku fajne unu ŝaloton, du ajlerojn kaj papavosemojn por la farĉaĵo. Metu flanke, vi uzos ĝin poste.
9. Antaŭvarmigu la fornon ĝis 230 gradoj kun supra kaj malsupra varmego.
10. Milde premu malgrandan truon en ĉiun bulketon kaj piku la truon per forko. Tio malhelpos la centron leviĝi denove en la forno.
11. Plenigu la truon per la plenigaĵo el ŝaloto, ajlo kaj papavosemoj. Brosu la bulkojn per olivoleo.
12. Metu la bakplaton en la fornon kaj baku la bulketojn dum 10 minutoj ĝis ili estos kuiritaj.
13. Servu ilin varmaj. Mi scias laŭ persona sperto, ke la bulketoj estas bongustaj, speciale en varma vetero! Ĉu vi ne sukcesas finmanĝi ilin? Vi povas tute bone frostigi ilin.

Fonto de ĉi tiu recepto: **Wereldrijs.blogspot.com**, *Blogo plena de bongustaj panreceptoj.*

Heleen van de Reep

Enigmo


F	L	O	R	B	E	D	O	F	L	J	A	O	O	F
S	U	N	O	M	B	R	E	L	O	Ŭ	T	B	J	A
A	I	L	O	A	E	K	F	N	R	E	U	R	E	L
S	S	K	T	N	U	P	J	O	J	O	C	E	R	Ĉ
P	O	O	O	N	O	A	R	O	L	I	N	H	T	M
E	F	Z	D	K	R	Ĝ	V	I	S	I	A	D	U	A
R	A	A	R	G	O	O	R	T	T	R	B	U	N	Ŝ
G	R	E	O	L	Z	A	E	U	O	O	N	R	O	I
I	T	M	A	U	B	R	E	K	B	K	N	T	D	N
S	E	K	R	L	N	O	D	E	B	R	A	D	R	O
S	S	G	U	O	R	U	G	I	F	N	O	F	I	Ĉ
E	O	B	U	T	C	U	R	P	Ŝ	O	N	L	B	A
S	A	R	K	I	A	R	B	O	Ŝ	E	L	O	F	S
T	I	V	I	T	L	U	K	O	M	P	O	Ŝ	T	O
Ŝ	P	A	T	O	R	A	L	I	N	E	D	R	A	Ĝ

besprenkelen - a
bloembed - f
bloemknop - f
boomschors - a
compost - k
graszode - g
heester - a
kiezelpad - g
kweken - k
ladder - e
maaimachine - f
mest - s
omspitten - t
onkruid - t
parasol - s
regenbak - c
schutting - t
snoeien - p
spade - ŝ
tuingereedschap - ĝ
tuinslang - ŝ
vogelhuis - b
vogelverschrikker - ĉ
vruchtbaar - f
wieden - s
zaaigoed - s

La solvo de la enigmo en la antaŭa numero de *Fenikso* (n-ro 2026/3) estas: **“Ĉiu sezono kun sia bono”**.
La ĝustan solvon sendis **Frans Verhulst, Gerard Gerritse, Kees Neeft kaj Jessie van Loon**.

La ludo estas kreita de Det Koning.
Sendu vian solvon al
redakcio@esperanto-nederland.nl

Solvo:



Niaj sudaj najbaroj denove organizas grandan Zamenhoffeston! En Belgio ekzistas jam tradicio organizi ĉiujare tutlandan festadon meze de decembro, ĉiam en alia parto de la lando. Ĉi-jare oni festos la naskiĝtagon de Zamenhof **la 12-an de decembro en Liĝo**. La aranĝon organizas la Lieĝa grupo kaj Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o). Ankaŭ nederlandanoj estas bonvenaj! Pliajn informojn serĉu en la Eventa Servo:

https://eventaservo.org/e/3363ad



La Zamenhoffesto en 2025. Foto: Yves Nevelsteen

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee.

Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zo veel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op. Stuur je bijdrage naar:

redakcio@esperanto-nederland.nl



La Komencinto

Teksto kaj desegnoj: Thijs van Viegen



Studieweekends in 2026 en 2027

In november 2026 gaan we weer naar natuurvriendenhuis Krikkenhaar in Bornerbroek, **van 6 t/m 8 november 2026**. Op dit moment zijn er nog 7 plekken beschikbaar. Er zijn veel nieuwe gezichten. Iemand die vroeger veel Esperanto heeft gesproken en deelnemers die nu voor het eerst Esperanto gaan leren. Onder de deelnemers zijn twee jongeren! Eén wil Esperanto leren, de andere spreekt al vloeiend Esperanto. Neem dus gerust je (klein)kind mee: hoe meer jongeren, hoe leuker. Zoals altijd zijn er lessen voor elk niveau, van absolute beginner tot gevorderde.

De kosten zijn € 105 voor leden van Esperanto Nederland, NEJ of een andere landelijke Esperanto-organisatie; anderen betalen € 115. Jongeren tot 18 jaar betalen € 50. Daarin zitten lessen, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee.

Subsidie mogelijk. Wil je graag mee doen, maar is het te duur? Jongeren uit Nederland kunnen van Esperanto Nederland een tegemoetkoming in de kosten krijgen. Stuur even een berichtje naar de organisatoren.

Een extra nacht? Ook nu hebben we huisje 't Krikske gehuurd, en wel tot maandagochtend – op zondag geven we namelijk les tot 15.00 uur. Wil je daarna nog een dag nagenieten van de omgeving en uitrusten van het Esperanto? Neem contact op met Ineke.

Nieuwe gezichten – nieuwe ideeën
Nieuw op vrijdagavond: een lezing én gesprek

Het interne idee en democratie – La interna ideo kaj demokratio. Van Zamenhof tot nu: over de twee zielen van onze beweging – de neutrale taalbrug én de strijd voor gelijkheid – en hoe je die oude droom met de middelen van vandaag verder draagt. Geen kant-en-klaar antwoord, maar een open uitnodiging: wat zou jij bouwen, en waar zit ik ernaast? Napraten mag, graag zelfs. Ronald Schippers leidt dit onderdeel.

2027

Ook volgend jaar zijn er twee studieweekenden. Het eerste staat gepland in het paasweekend, **26 t/m 28 maart 2027** – handig, want maandag ben je toch al vrij van school of werk. En wie wil, blijft gewoon een nachtje langer.
Op 5 t/m 7 november 2027 is het volgende.

Je zult wel nieuwe gezichten zien: na tien jaar geven de huidige organisatoren het stokje (of het sterretje) door. Tijdens het afgelopen weekend meldden zich al drie mensen aan: Ronald Schippers, Ron Winteraeken en Ineke Bourguignon-Slis. Komen er nog een paar bij, dan hebben we een mooi team van vijf à zes. Wie houdt er van koken? Meer weten? Neem contact op met Ineke Bourguignon via
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Ineke Emmelkamp

PostNL
Port Betaald
Port Payé
Pays-Bas

Fenikso
Jarkolekto 31, n-ro 4/5
Julio - Oktobro 2026

eventueel retouradres: Esperanto Nederland Ledenadministratie, Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord